

EKO 2023



Nia aganto pri
instruado kaj
progreso

Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj



EKO 2023 / 50 Aŭgusto 26, 2023

Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Elda Doerfler, Gbeglo Koffi.

Pezo: Word nur teksto: 40 KB; Ĝia sveltigita PDF: 390 KB.

Alkroĉaĵo: Glacikremoj: 182, Sume: 612 KB

Temas nur pri PDF, kiun SMG mem alkroĉis. La pezo de aŭtomate kreitaj PDF ne estas anticipe koneblaj.

Rekonataj 'Tagoj' de UN

Por vidi la tagojn en tri lingvoj: Eo, la angla kaj franca:

<http://www.un.org/en/sections/observances/international-days/>

Tagoj aparte atentataj de UEA. Speciale gravaj estas tiuj diklitere indikitaj.

24 jan. Internacia Tago de Edukado

27 jan. Internacia Tago de Memoro de la Viktimoj de la Holokaŭsto

21 feb. Internacia Tago de la Gepatra Lingvo

8 mar. Internacia Virina Tago

21 mar. Internacia Tago por Eliminado de Rasa Diskriminacio

15 majo. Internacia Tago de Familioj

21 majo. Monda Tago por Kultura Diverseco; por Dialogo kaj Evoluigo

20 jun. Monda Tago de Rifuĝintoj

26 jul. Esperanto-tago

30 jul. Internacia Tago de Amikeco

9 aŭg. Internacia Tago de la Indiĝenaj Popoloj de la Mondo

12 aŭg. Internacia Junulara Tago

21 sep. Internacia Tago de Paco

30 Sep. Internacia Tradukada Tago

1 okt. Internacia Tago de Pliaĝuloj

2 okt. Internacia Tago de Neperforto

24 okt. Tago de Unuiĝintaj Nacioj

16 nov. Internacia Tago por Toleremo
20 nov. Monda Tago de Infanoj
10 Dec. Internacia Tago de Homaj Rajtoj
15 dec. Zamenhof-Tago
20 dec. Internacia Tago de Homa Solidareco

Lingvaj Tagoj por la ses lingvoj de UN

20 mar. Franca; 20 apr. Ĉina; 23 apr. Angla; 23 apr. Hispana; 6 jun. Rusa;
18 dec. Araba

Kompilis Humphrey Tonkin, 2023 aŭgusto.

La Granda Ĉeno en la Kongreso de ILEI

La oka parto de la Granda Homa Ĉeno de ILEI, laŭ ideo de Max Garcia, atingis la kongreson de la esperantistaj instruistoj kaj junuloj en Linjano Orsabl (Lignano Sabbiadoro), Italio, 2023. Bonvolu partopreni en la venonta parto.

[La Granda Homa Ĉeno 8 Atingis Linjanon!](#)

Nova prezidanto de Brazila Eo-Ligo (BEL)

Nova regulo estas tiu: de nun ne ĉiuj **Intervjuoj** faritaj por la Klubo restos fermitaj nur al anoj. Kelkaj el ili troveblas malfermitaj en la jutuba kanalo de Brazila Kolekto. Ekzemple, ĉi-semajne jam aperis en la kanalo du intervjuaj videoj.



Kun **Querino Neto**, prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo kaj kun **James Piton**, filatelisto, tradukisto kaj patro de denaskuloj:



La video estas de plia frua komponaĵo de **Chico Buarque**, kies originala titolo estas la virina nomo *Januária*. En Esperanto ĝi nomiĝas *Januara*, kaj la traduko estas de **Flávio Fonseca**: Klaku la bildon por spekti ĝin.

AMO resume: Naŭ jaroj da historio

La programo de AMO (Aktivula Maturigo) estas nun naŭjaraĝa kaj jam okazis 102 seminarioj en ĉiuj kontinentoj.

Sur la sekva paĝo ni prezentas resumon pri la jaroj en kiuj okazis unufoje la seminarioj de AMO. Plie vi vidas ĝisdatigitan mapon pri la lokoj de la seminarioj.

AMO: landoj laŭ la unua AMO-seminario



2014: Hungario (1), Kanado (2), Brazilo (3), Ĉinio (4), Italio (5), Slovakio (6), Togolando (7), Germanio (8).

2015: Svedio (11), Usono (12), Kongo DR (13), Francio (15), Kubo (16).

2016: Nepalo (20), Indonezio (21), Turkio (23), Danlando (24), Tanzanio (29).

2017: Kartvelio (31), Pollando (34), Svislando (35).

2018: Maroko (45), Burundo (46), Portugalio (50), Rumanio (51), Ukrainio (52).

2019: Vjetnamio (55), Serbio (58).

2020: Nov-Zelando (62), Norvegio (69).

2021: Japanio (73 kaj 79), Kroatio (78).

2022: Aŭstralio kaj Hungario (86). Litovio (87), Senegalo (91).

2023: Ĉeĥio (99), Latvio (101).

AMO: la mapo kun la disvastiĝo de la seminarioj



UN kaj Unesko en Torino

Internaciaj aferoj kaj la laboro de UN kaj Unesko ricevis atenton dum la kongreso – en la Movada Foiro, en unu fermita kaj unu publika kunveno pri UN/Unesko, kaj en la kongresa rezolucio. La kongresa temo, ‘Enmigrado – kunfluo de homaj valoroj’, estis escepte bone organizita ĉi-jare kaj rezultigis la kongresan rezolucion.

Disponebli: (1) la raporto pri UN kaj Unesko verkita cele al la Estrara Raporto de UEA, (2) raporto pri la kontribuo de la Esperanto-Koruso al la Internacia Tago de Paco, (3) kelkaj ekzempleroj de ĝisdatigita historio de Unesko kaj Esperanto.

Trideko da ekzempleroj de la Gvidilo al la 17 Celoj por Daŭripova Evoluigo estis disdonitaj al tiuj kiuj aparte esprimis interesigon pri tiu temo. Fermita kunsido por reprezentantoj de UEA ĉe UN kaj Unesko kaj publika kunsido pri UN kaj Unesko en ĵaŭdo. Prezidis Humphrey Tonkin kun la estrarano de UEA François Lo Jacomo. La fermita kunsido, limigita al aktivuloj montriĝis aparte utila. Ĉeestis, inter aliaj, Alfred Heiligenbrunner (Vieno), Norina Schantl (Vieno), Cesco Reale (Ĝenevo), Mireille Grosjean (Ĝenevo), Alain Favre (Ĝenevo), Nicole Margot (Ĝenevo), Humphrey Tonkin (Novjorko), François Lo Jacomo (Parizo), Didier Loison (Parizo). Ĉeestis ankaŭ la kunredaktoro de la Gvidilo al la 17 Celoj, Rakoen Maertens, kaj deko da aliaj aktivuloj. Cesco Reale sugestis, ke ni antaŭvidu en 2023-24 regulajn Zoom-kunsidojn.

Diskutataj estis ĝisdatigo de la gvidlibro pri la Celoj, la retejo <esperantoporun.org>, la Facebook-paĝo UN kaj Internaciaj Aferoj kaj aliaj temoj. Humphrey Tonkin aparte raportis pri la lastatempa kunsido kun la Prezidanto de la Ĝenerala Asembleo pri la lingva politiko de Unuiĝintaj Nacioj – kunsido esence reĝisorata de UEA kaj aparte atentinda pro tio, ke interpretado estis liverita ne nur en la ses lingvoj de UN sed ankaŭ en Esperanto, danke al kunlaboro de kelkaj elstare lertaj kaj inventemaj esperantistoj. La publika kunsido pri UN kaj Unesko allogis 20-30 kongresanojn, kiuj iom perdiĝis en la granda halo. La kunsido konsistis esence el raportoj pri la agado kaj demandoj de la publiko, inter kiuj estis pluraj homoj, kiuj anoncis sian pretecon kunlabori en la agado. Menciitaj estis la evoluoj en Novjorko, la kunlaboro en aliaj UN-centroj, laboro por la 17 Celoj – kaj la graveco ekspluati la fakton, ke la venontjara kongreso okazos en Afriko.

Ni interalie lanĉis la ideon, ke okaze de tiu ĉi UK en Afriko, UEA ekhavu reprezentanton ankaŭ en Najrobio, kvina sidejo de UN. Ni menciis nian oficejon en Novjorko, necesan kunlaboron kun TEJO, eblon, ke UEA iĝu en asociaj rilatoj kun Unesko, kun avantaĝoj kompare kun la nunaj konsultaj rilatoj, kaj du gravajn celojn: la Tagon de Esperanto kaj Esperanton kiel nemateria kultura heredaĵo de la homaro. Tra la kongresa semajno okazis kunvenoj pri la kongresa temo, lerte reĝisorata de Thomas Bormann. La finaj rezolucio kaj raporto enhavas utilajn konkludojn, uzeblajn en la kontaktoj kun UN kaj Unesko. La rezolucio estis sendita al UN, pere de la Branĉo NROj de Ekosok, en Esperanto kaj la angla.

H.T. kaj F.L.J., aŭgusto 2023

Testudoj aĉetas glacikremojn

Ni alroĉas plian instruan helpilon el la bunta kolekto de SMG.

===== vortoj: 1050 =====

La kolekto de EKO por 2023:

<https://www.ilei.info/agado/EKO.php> (ĝis 42 kaj tre baldaŭ 50).

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>:.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@ce@gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldona al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.